

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Augusti 1947

35 årg. Nr 8

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## SUKCESO: Instruistkursoj, subvenciitaj de la sveda ŝtato



La partoprenantoj de la instruistaj kursoj.

Dum la tempo 16—26 julio okazis en Stockholm esperanto-kursoj por svedaj geinstruistoj. Por la kvara fojo la sveda ŝtato, t. e. la registaro kaj la parlamento, asignis monon por tiaj kursoj. La antaŭaj okazis en la jaroj 1929, 1930 kaj 1931.

En tiu ĉi jaro la parlamento decidis disponigi 5.000 kronojn al la direkto de Sveda Esperanto-Instituto por ebligi al ĝi aranĝi la kursojn. La partoprenintoj ĝuis ekonomian favoron: ili ricevis ne nur senpagan kursotizon, sed ankaŭ senpagan vojaĝon de la hejmloko al Stockholm kaj rekompencojn por siaj elspezoj (= loĝo kaj manĝo) dum la kurso per 7 kronoj ĉiutage (= ĉ 10 anglaj ŝilingoj).

Sin anoncis al la kursoj 61 geinstruistoj, kaj el ili 40 estis akceptitaj kiel kursanoj. Kun granda intereso kaj fervoro tiuj vizitis la lecionojn, kiuj estis gvidataj de d-ro Ferenc Szilágyi el Budapeŝto, kiu instruis laŭ sia metodo (publikigita en lia bone konata lernolibro),

kaj de fil. kandidato Johan Rosbach el Oslo, kiu instruis laŭ la cseh-metodo. La kursprogramo estis tiel aranĝita, ke la kursanoj grandparte povis aŭskulti la lecionojn ankaŭ de la paralela kurso. El pedagogia vidpunkto tio estis tre grava, ĉar tiel ĉiu kursano ekhavis bonan percepton pri ambaŭ metodoj. Post la lecionoj okazis diversaj prelegoj pri pedagogiaj kaj aliaj temoj.

La kursoj fariĝis bela sukceso, kaj aŭtune certe multaj novaj kursoj por lernejunuloj estos aranĝataj de la instruistoj, kiuj nun finis la somerajn kursojn.

Estas evidente, ke la okazigo de tiaj kursoj signifas grandan apogon al la Esperanto-movado ĝenerale. Estas ankaŭ evidente, ke se la ŝtato donas monsubtenon al kursoj por geinstruistoj, ĝi poste logike ne povos rifuzi provkursojn en iu formo en la kadro de la lerneja tagordo.

E. Malmgren.

La Espero, aŭgusto 1947.

## Pri manuskriptoj

Mi deziras iom babili pri la manuskriptoj, kiujn mi ricevas. Ĉiuj amikoj de la gazeto estas bonvenaj kun manuskriptoj por la gazeto. Mi havas grandan paperkorbon, kaj mi fariĝas pli kaj pli dikhaŭta, kiam mi traktas la manuskriptojn. Do, ne timu min ĝeni! Sed, mi ne deziras, ke vi propagandu esperanton al esperantistoj! Ili tediĝas de tia legado! Tial skribu pri io pli interesa! La esperantistoj scias, kiom bona estas la lingvo.

Kaj kiam vi skribas, bonvolu skribi mallonge. Se vi povas diri aferon per dek vortoj, ne uzu tri-dek! Kiam vi rakontas ion, vi ne nepre komencu per la kreado de la mondo. Ĉar se vi tion faras, sekvas diluvio en la gazetaj kolonoj! Ĉiam mi daŭre klopodas trovi lokon por distra legado, kaj malbone sukcesas. Do, helpu al mi!

La enhavo de la manuskriptoj estas la plej grava. Sed kial persiste malatenti la aspekton? Pro tio, ke la kompostistoj ne komprenas esperanton, mi devas neskribi ĉiujn ne tre klarajn manuskriptojn per la skribmaŝino. Kaj tio postulas tempon. Manskribitajn manuskriptojn mi entute ne povas liveri. Ilin mi devas ĉiam neskribi. La laŭ teknikaj vidpunktoj ideala manuskripto estu skribita per skribmaŝino (kun ia, negrave kia, signo super ĉiu litero, kiu en esperanto endas havi tian) sur nur unu flanko de hela ne tro maldika papero en formato A4 aŭ 4:0, kun minimume 2-centimetra margeno maldestre kaj 4-centimetra dekstre de la teksto, kiun vi skribu per duobla spaco inter la linioj.

Tiu regulo nepre ne detimigu tiujn, kiuj ne posedas skribmaŝinon, de ensendo de manuskriptoj, sed tiuj, kiuj havas skribmaŝinon, ja same bone povas atenti la regolon, kiel neglekti ĝin. Dankon!

Mi esperas, ke la legantoj pardonas al mi, ke mi pro la somera varma vetero metas tiun ĉi artikolon en tiun ĉi lokon.

La redaktoro.

## Studieledarekurs på Brunnsvik

För första gången i den svenska esperantorörelsens historia anordnade Arbetarnas Bildningsförbund 8—21 juni en kurs för studieledare i esperanto på det traditionsrika Brunnsvik. Kursen räknade 19 deltagare från alla delar av landet, och den leddes av folkskollärare Einar Dahl i Uddevalla. Kursprogrammet omfattade dels föreläsningar av kursledaren i pedagogiska ämnen och metodik, om språkens utveckling, esperantos historia och litteratur m. m. dels seminarieövningar, varvid kursdeltagarna fick till uppgift att gå igenom vissa grammatiska avsnitt. Dessa lektioner kritiserades sedan. Kursdeltagarna höll även diskussionsinledningar om propaganda, klubbarbete etc. som alltid följdes av ett livligt meningsutbyte med många värdefulla synpunkter. Tolkningsövningar hölls, och skriftliga övningar på översättning av svedismer och sådana detaljer, vari svenskan och esperanto skiljer sig, förekom. Uttalet ägnades särskild uppmärksamhet.

Det var en omväxlande och givande kurs, fylld av arbete, men det kan noteras, att samtliga kursdeltagare på ett utomordentligt sätt fullgjorde sina uppgifter och med aldrig slappnande intresse tillgodogjorde sig kursens lärdomar.

All undervisning ägde rum på esperanto, som också deltagarna konsekvent använde utanför lektionerna. Det blev en god propaganda, som bl. a. resulterade i, att 50 läroböcker såldes. Studierektor Hirdman avtackade vid avslutningen kursledaren och lovade att för sin del medverka till, att kursen upprepas under kommande år.

Vid ett avslutningssamkväm, som esperantokursen höll, riktades många erkännans ord till kursledaren, som på ett förstklassigt sätt lett kursen, och hr Dahl erhöi som minnesgåva "All världens lyrik" i ett vackert band.

Buccio

## Folkskolan och esperanto

Vid Uddevalla Folkskolor har sedan höstterminen 1942 bedrivits frivillig undervisning i esperanto med 1 timme per vecka i anslutning till det ordinarie schemat. Jag har under dessa fem läsår, varunder undervisningen pågått, gjort vissa praktiska rön, som jag anser så värdefulla, att de bör komma till en större allmänhets kännedom och bör beaktas av de myndigheter i vårt land, som beslutar om den svenska folkskolans angelägenheter.

För det första är det bland folkskolans lärare ett känt faktum, att kunskaperna i svensk grammatik merendels är skrala bland folkskolans elever. Det är inte lätt att levandegöra grammatikens torra abstraktioner för barn, och det är ju det, som vill till för att kunskaperna, som inhämtats, ska stanna i minnet.

Det har nu visat sig, att de barn, — det rör sig om elever i folkskolans 5:e och 6:e klasser — som studerat esperanto, förstått och behållit de grammatiska elementa på ett anmärkningsvärt sätt. Det är lättförklarligt: eleverna har i det enkelt och logiskt uppbyggda esperanto fått se grammatikens regler i praktisk funktion och därmed också begripit dem, och därför stannat kunskapen. **Esperanto fördjupar kunskapen i modersmålet.**

De elever, som från 6:e klass avgått till högre skolor och där börjat studera tyska och engelska, har tack vare sitt studium av esperanto och sin grammatiska insikt haft lättare att förstå och inhämta dessa främmande språk. De internationella ljud, som esperanto har i sitt alfabet, har också underlättat studiet av de främmande språken. Detta har framhållits av lärare vid stadens praktiska mellanskola. **Esperanto främjar sålunda studiet av främmande språk.**

En livlig klasskorrespondens har under åren pågått mellan esperantoklasserna i Uddevalla och klasser i England, Frankrike, Italien, Polen, Argentina etc. Uddevallabarnen har berättat om t. ex. den svenska skogen, västkustfisket, stenindustrien, Sveriges växter och djur och belyst framställningen med vykort, tidningsurklipp, teckningar, pressade växter m. m. I gengäld har de fått motsvarande inblickar i andra länders folkliv, natur och näringar. Denna kollektiva brevväxling har jag själv handlagt. Geografiundervisningen har berikats, och många små detaljer kastat ljus över de stora sammanhangen. **Esperanto skänker undervisningen ett levande innehåll.**

Efter en kort tids studium av esperanto får barnen börja individuell korrespondens. Läraren hjälper till och ger råd, och med ett enastående intresse ägnar sig barnen åt brevväxlingen. De berättar om sina personliga förhållanden, om lekar och upplevelser. Det blir enkla och vardagliga små brev med frimärken och fotografier i. Folkskolans handikappade elever ser språkmurarna falla. **Esperanto skapar kontakter över gränserna.**

Härmed är vi inne på esperantos ideella betydelse. Ett internationellt språk skapar förutsättningarna för mellanfolklig förståelse. När ska den grundläggas om inte i barnåldern? Och på vad sätt blir den effektivare än genom ett hjälpspråk, som inte begränsar kontakten till ett visst språkområde eller ett visst folk. Enligt mitt sätt att se saken måste denna möjlighet att komma i förbindelse med alla folk vara av avgörande betydelse, ifall man vill se frågan utan traditionens och fördomens skyggglappar. Esperanto ger denna möjlighet till världskunskap, som intet av nationalspråken kan skänka. När Esperanto dessutom i jämförelse med nationalspråken är så lätt att lära fullständigt, så måste envar, som utan förutfattade meningar går denna fråga in på livet, säga sig, att här har vi ett språk, som passar den moderna tidens teknik och strävanden. Ur pedagogisk synpunkt är Esperanto skolans språk framför alla andra.

Einar Dahl

# Per esperanto por la junularo:

## Giganta labortasko

Grava atentigo al instruistoj, kursgvidantoj kaj kluboj!

La nunjara kongreso de SEF faris gravan decidon, nome dediĉi nian plenan atenton al laboro por kaj inter la junularo. La proponanto, s-ro Teodor Julin, kiu mem estas varma amiko de la junularo, tutcerte pravas, kiam li substrekis en Gävle la gravecon de aktiviĝo sur tiu laborkampo. Estas giganta labortasko, kiun ni devas urĝe sed tre atente prizorgi. La redakcio de La Espero petis de unu el la estraranoj, s-ro Lennart Åberg en Skövde, sugestojn kaj praktikajn vidpunktojn pri la aktuala tasko. Jen li parolas:

Movado, kiu sopiras je vivo kaj sana evoluo, nepre devas zorgi pri kontakto kun la nova generacio. Por la disvastigo kaj firmigo de nia lingvo kaj movado ankaŭ ni devas alvoki kaj ligi al ni junularon, kiu uzos esperanton por praktikaj celoj de la hodiaŭo. Feliĉe ni ĝis nun vidis en niaj vicoj agemajn, junajn homojn, kiuj sindone laboris por nia nobla afero. Sed mankis al ni la kontinua alkondukiĝo de infanoj kaj lerneja junularo.

En kelkaj lokoj de nia lando ni faris provojn enkonduki esperanton en la lernejojn. Dank' al la sinofarado de la kursgvidantoj, plejofte profesiaj instruistoj, ni ankaŭ certgrade sukcesis akiri permeson instrui esperanton kiel libervolan temon en kelkaj popollernejoj. Por la geknaboj, kiuj ĝenerale tre facile sekvas la instruadon, ĝi donis utilecon diversan; kelkaj jam tre baldaŭ scipovas tiom, ke ili entreprenas korespondadon kun samaĝuloj en aliaj landoj, interŝanĝas poŝtmarkojn, desegnaĵojn, kaj ĉefe pensojn. En tiu ĉi somero kelkaj eĉ faras sian unuan eksterlandan vojaĝon, irante al la junulara kongreso de TJO en Ipswich, Anglujo.

Sed ni konscias pri la nesufiĉeco de nia ĝisnuna laboro. Ni ankaŭ volonte rekonas la mankojn, kiuj montriĝis en nia agado sur tiu nova kaj grava agadkampo. Iom post iom ni havigis al ni helpilojn! Aperis la bona lernolibro por lernejoj, verkita de Einar Dahl, Uddevalla. Jam nun kajero kun labortaskoj estas preparata kiel aldonaĵo por la lernolibro! Ĉe la esperantista eldonejo Muusses en Purmerend, Nederlando, aperis diversaj helpiloj por la instruado al infanoj.

Ne estas mia tasko paroli pri la instruado. Tiun gravan parton mi volonte preterpasas, sciante, ke inter la svedaj esperantistoj nun tre aktive laboras geinstruistoj, kies komprenebla ambicio kaj pedagogia lerteco certigos sukcesojn tre ĝojigajn. Sed nia laboro inter la plej junaj postulas de ni grandan laboron ekster la instruaj horoj mem. Tion mi volas skizi laŭeble koncize.

Kiam geknaboj komencas lerni esperanton, ili kompreneble atendas rezulton! Kelkaj eĉ maltrankviligas, kiam la rezulto ne estas sufiĉe rapide videbla. Sed ĉiam restas bravaj lernantoj, kiuj obstine kaj ofte kun rimarkinda talento progresse marŝas antaŭen! La kurso de esperanto fariĝis centra punkto en ilia estado. Por konstante teni, vekti kaj reveki ilian intereson necesas fondado de societa kunestado en kaj ekster la lecionoj. La kurso de esperanto devas fariĝi la plej ŝatata kunvenejo, kiu donas ion, ekstran kaj konstante estas la pinto inter la konkurantaj gejunulaj societoj. Ni ne konkurencu kun la fortaj kaj viglaj movadoj junularaj; plej volonte ni provu kunlaboron kun skoltaj, abstinecaj, kristanaj kaj politikaj societoj de junularo. Tamen ni devas prezenti ĉiam al niaj lernantoj eblecojn distri sin, utiligante la studadon mem kaj la naturajn rimedojn por aktiveco inter la gekamaradoj.

Estas malfacile doni detalajn ekzemplojn. Sed mi scias, ke unu el niaj plej ŝatataj kaj ekskluzivaj eblecoj estas la internacia korespondado. Individue kaj grupe la geknaboj havu kontaktojn translimajn, kiujn ili tre atente kaj akurate prizorgu. Devas esti aranĝataj specialvesperoj de korespondado, kiam la junulara gvi-

danto (instruisto) helpas kaj sugestas, donas praktikajn ekzemplojn kaj... tio estas grava, ebligas al la korespondantoj mem agi. Laŭtleĝado de korespondadoj, montrado de fotoj, desegnaĵoj kaj bildkartoj interŝanĝitaj kaj samtempa geografia ekzercado, uzante landokartojn kaj lernolibrojn de geografio pri la koncerna lando — jen gravaj punktoj de la vesperoj, kiuj kreas memfidon kaj sanan fierecon ĉe la gejunuloj aktivaj.

Kolekatado de poŝtmarkoj estas tre ŝatata sinokupo de multaj geknaboj. Jes, sendube la esperantista junularo havas grandiozajn avantaĝojn, kiujn ili avide eluzas. Kial ne fondi junularan klubon de poŝtmarkkolektantoj? Aŭ — kio eble estas eĉ pli efike — proponi membrecon de "niaj" gejunuloj en jam ekzistantaj kluboj filatelistaj. Jen bona medio por propagando!

Kantado estas ĉiam tre grava parto de la lecionoj. Se inter la kursanoj estas eĉ pli ol mezbonaj talentoj, la kantado povas esti ekzercata pli serioze. Ĥoretoj povas esti starigeblaj, se la gvidanto de la grupo mem povas zorgi pri tio aŭ aliance ricevi helpon de spertulo. Sed ĥoroj de parolo estas ankaŭ interesa kaj efikoplena aranĝo.

Fine mi volas mencii alian gravan punkton de la programo por niaj gejunuloj. Ni devas fari ekskursojn. Kompreneble ni trovas bonan distron, se ni ekskursas en la hejma regiono, sed eĉ pli interesa estos la vojaĝoj de la grupoj al aliaj lokoj novaj. Sekve de tiaj aranĝoj ni bezonas monon. Jen bona okazo starti ŝparklubojn inter la geknaboj esperantistaj. La "statuto" de la ŝparklubo estu simpla: la mono estu uzota nur por vojaĝoj, aranĝitaj de la esperantistoj.

Vojaĝoj eksterlanden! Ho, kiom logas tiu esprimo, kiam junaj cerboj fantazie revas pri renkontoj de karaj geamikoj-korespondantoj sur fremda tero. Ankaŭ tio devas esti realigebla! La necesa mono povas esti ricevebla, se ni kunlaboros energie inter la jam ekzistantaj grupoj. Petskriboj al publikaj instancoj de instruado kaj junulara zorgado povas doni certan kontribuadon, la ŝparado de la junaj membroj mem estas el diversaj vidpunktoj rekomendinda kaj necesa kaj lokaj interesiĝantoj povas esti varbeblaj por doni sian subtenon! Se ni ĉiujare povas sendi trupeton (kial ne grandan grupon aŭ eĉ multajn) da junaj esperantistoj eksterlanden por somera ferio- kaj studvojaĝo aŭ vizitoj en la internaciaj tendaroj de TJO, nia labro estos alte taksata kaj por ni mem fruktodona!

Mi skizis tre rapide nur kelkajn sugestojn, kiujn kunlaboremaj esperantistoj, geinstruistoj aŭ gvidantoj de nia juna gvardio povas pripensi! La fundamento tamen devas esti la studoj; sed paralele estas ege necesa saĝa, vigla kaj por la gejunuloj utila kompletigo per aranĝoj de la skizitaj tipoj.

## - MĀNADENS BOKTIPS -

**PREMAJ ROMANETOJ** kr. 2:50

23 rakontetoj de Konkursintoj.

"Ne homa: Tia estas la persono kiu ne povas trovi en ĉi tiu libreto ion, kio plaĉas al li."

T. Pendlebury i "Esperanto Internacia"

W. Shakespeare:

**ANTONIO KAJ KLEOPATRA** kr. 2:50

Övers. av S. A. Andrew.

"Bedaŭrinde, tradukoj tro ofte meritas kritikon se ne mallaŭdon. Des pli plaĉe estas, senhezite povi rekomendi ĉi tiun libreton."

N. H. C. M. i "Esperanto"

10 % för porto tillkommer.

Likvid emottages gärna i frimärken.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 190 71

Stockholm 19

Postgiro 578

## Om höstens propaganda

Till sekretariatet ringde för några dagar sedan en esperantist, som inte varit aktiv sedan före kriget, och ville bli prenumerant på Svenska Esperanto-Tidningen för att återknyta kontakten med esperanto. Han tyckte att det talades alldeles för lite om esperanto nu för tiden och trodde därför, att det inte fanns något liv i rörelsen.

Just det! Det talas alldeles för lite om esperanto. Esperantister finns det ganska gott om, men de gör inget väsen av sig. Det är det vi skall hjälpa åt att råda bot för. Allmänheten skall få höra talas om esperanto i höst och även i fortsättningen.

Varenda esperantist, som läser det här, bör till hösten rekvirera propagandamaterial från SEF och använda det — sätta upp affischer på anslagstavlor, på plank, i kaféer m. m., organisera utdelningen av de tre flygbladen på ett förnuftigt sätt samt i övrigt, särskilt under de sista veckorna i september, efter bästa förmåga bidra i höstpropagandan. Då kommer folk inte att kunna undgå att ideligen stöta på meddelanden om esperanto. Och glöm inte, att tidningarna är vårt bästa reklammedel. Det är alldeles utmärkt, om man bara får in en notis på en sju, åtta rader då och då, bara esperanto är nämnt en gång i den. Försök på allt sätt ordna notiser i lokalpressen gång efter annan, helst med lite nyhetsvärde! Det gör nytta! Det tryckta ordet har folk respekt för.

Om några dagar går det ut ett cirkulär till klubbarna och de direkt anslutna esperantisterna. Sänd in den rekvisitionsblankett å propagandamaterial, som medföljer, före den 20 aug.

Förberedelsearbetet för propagandakampanjen har varit mycket tidskrävande, men har påbörjats i god tid. Låt oss inte förfuska resultatet genom en dålig medverkan eller genom att uppskjuta behandlandet av kampanjen i klubbstyrelserna eller genom att sända in rekvisitionsblanketterna för sent!

Kanske tycker mången esperantist, att han eller hon kan göra så lite. Men vem det än vara må kan i alla fall sätta upp en affisch här och var på vägen till arbetet, eller då han är ute och promenerar, om han nu inte enkom vill åka ut för att göra en planlagd affischering. Det är de mångas medverkan, som gör kampanjen effektiv. Resultatet bedömer man inte bara efter antalet kurser, som kommer i gång, utan på folkets reaktion, när de hör esperanto.

Flygbladen blir i år tre:

1. Ett i enkelformat 13×20 cm med en del fakta om esperanto, reklam för korrespondenskursen, samt nerst en kupong för rekvisition av resebroschyren. Flygbladet kan också erhållas utan denna kupong, men med plats för lokalt tilltryck. Detta flygblad är avsett för massspridning.

2. Professor Björn Collinders uttalande om esperanto. Ett särtryck av den artikel, som är införd i Esperantotidningens septemhernummer 1945. Formatet blir dubbelt 13×20. Det är avsett att som ett auktoritetsuttalande användas i diskussioner, men är också lämpligt att placera i bibliotek, lärum och på liknande ställen.

3. Cirkulär om Brevskolans korrespondenskurs. Formatet är dubbelt 13×20. Det är avsett att lämnas till dem, som frågar, hur de skall kunna lära sig esperanto, där det inte finns lokal kurs.

Resebroschyren är en så pass påkostad trycksak, att man inte kan tänka sig någon massspridning av den. Därför sändes den endast efter personlig rekvisition till intresserade.

Gör en privat planläggning av propagandan på Er ort. Klubbstyrelserna bör snarast sammankalla klubbarna. Dessa har ett stort ansvar i höstens kampanj. Det är de, som skall göra det stora arbetet.

Platser med klubbar bör dränkas i propagandamaterial. Planera, rekvirera, affischera, men glöm inte när-

## En jättestudiecirkel av lärare

Alla måste vara intresserade av esperantos införande i våra skolor. I all synnerhet de lärare, som förstår esperantos betydelse för den svenska folkskolan. Vi måste samla erfarenheter, som vi senare kan stödja oss på, när vi känner oss starka nog att hos högre myndigheter begära plats på schemat. Det är praktiska resultat, som måste fram.

Skulle inte vi lärare under det kommande läsåret kunna slå ett ordentligt slag för esperanto. Jag har en plan, som passar både dem, som redan stiftat bekantskap med esperanto, och dem, som ännu ej börjat studera. Ta del av förslaget, tänk över det och handla.

Jag har tänkt mig, att vi skulle bilda en studiecirkel med 100 lärare och lärarinnor, placerade över allt i vårt land. Dessa 100 skulle vara villiga att under kommande läsår starta esperantoundervisning i sin egen klass eller med andra lärjungar. Samtidigt som lärarna själva — om så behövs — studerar lektion för lektion, så skulle de undervisa sin klass.

Följande skulle gälla:

Vi använder **Lärobok för skolan**, som skolor får för 1.25 exemplaret, och den **Arbetsbok** till 50 öre, som utkommer till hösten.

Varje esperantoklass består av högst 15 elever ur 5 eller 5 och 6 klasserna, alltså elever i 12—13 års åldern.

Lektionerna hålles en per vecka i anslutning till det ordinarie schemat.

Undertecknad tjänstgör som studieledare, och det går alltså att vända sig till mig för rådfrågning i allt, som rör denna vår studiecirkel. Det gäller ju främst dem, som tidigare inte studerat esperanto.

Jag tycker, att det skulle finnas förutsättningar för en samlad aktion av detta slag. De lärare och lärarinnor, som vill vara med och förverkliga denna tanke, anmäler sig till mig snarast möjligt.

Esperantoklubbar och esperantister, som inte har lärarfolk bland medlemmarna på sin ort, kan också vara med på så sätt, att de söker värva en lärarkraft, som är villig att på ovan skisserat sätt själv lära sig esperanto och samtidigt undervisa. Med den lärobok, som vi kommer att använda, går detta mycket bra för sig.

Vänta nu inte. Anmäl er omgående till folkskollärare Einar Dahl, U d d e v a l l a, så att vi kan sätta igång vid läsårets början.

### Till den esperantokurs,

som under tiden 8—17 aug. hålles på Tostarp i norra Skåne, nära Tormestorp station, under fru Anna Alamos ledning, mottages anmälningar intill den 5 augusti. Undervisning i esperanto för såväl nybörjare som mera försigkomna. Som utländsk lärare medverkar holländaren H. A. van Hoog. Inkvartering i lägerstil (logement med sängar) kostnadsfritt. Mat till självkostnadspris. Kursavgift 8 kr. varav 5 kr. i anmälningsavgift, som sändes pr postgiro nr 9 14 39 till Svenska KELI, Flen. Deltagarna i kursen skola medföra sänglinne och handdukar. Adressen till lägret är Tostarp, Tormestorp. Upplysningar lämnas av Arthur Wallin, Tegnérsgatan 8, Stockholm Va (tel. 31 85 24).

liggande orter, som icke har aktiva esperantister! Gör en cykelutflykt med klubbisterna! Affischera under vägen och sprid flygblad! En sådan färd kan ju göras till ett trevligt inslag i klubblivet.

Alltså: Alla hjälper till och alla sänder in materialrekvisitioner före den 20 aug.

Sekr.

# Kroze tra la lingvo

## Pri la deveno de la sufiksoj

Kun granda intereso mi legis en la aprila numero pri "Sufiksa etimologio" de E. Vilborg, des pli ĉar mi mem multe min okupis pri ĉi tiuj aferoj. Estu tial permesate al mi aldone iom babili pri ĉi tiu temo kiel kompletigo por tiuj kiuj havas intereson pri jenaj demandoj.

ar

La sufikson **ar** ni retrovas ne nur en la lingvo latina sed ankaŭ en aliaj, kvankam ĝi kompreneble originas en la latina, ekz. en la angla **library** (libraro, biblioteko). Ankoraŭ pli bona ekzemplo estas la vortparo **dictionary-vocabulary**, france: **dictionnaire-vocabulaire**, hispane: **diccionario-vocabulario**, latine: **dictionarium-vocabularium** (vortkolekto, vortlisto, vortaro). En la hispana lingvo cetere ankoraŭ ekzistas vivanta sufikso **ar**, per kiu el arbonomoj oni derivas kolekton, "arbaron" de tiuj arboj ekz. **pinar** pin(arb)aro, **castañar** kaŝtandarbaro.

ej

La sufikso **ej** certe ne estas pli artefarita ol la ceteraj. Sendube ĝi devenas de la germana finaĵo **ei** ekz. en **Bäckerei** (bakejo, panfarejo), **Bücherei** (librejo, biblioteko), **Konditorei** (sukeraĵejo, konfitejo) kaj multaj aliaj. Interesa estas ankaŭ **Abtei** (abatlando). En **ei** ni efektive retrovas la neoficialan sufikson **-io** de landnomoj. Laŭ la ĝeneralaj sonleĝoj nome mezepoka longa **i** fariĝis diftongo **ei** kun la prononco **ej**, dialektoj **ej**, ekz. **Wein** el **win** (vino), **mein** el **min** (mia) ktp. La saman evoluon ni trovas en la angla, kvankam pro konservatismo en la ortografio oni ankoraŭ skribas **i**, ekz. **wine** (ŭajn), **mine** (majn). Parenteze oni povas mencii ke la vorton **Melodie** en la mezepoka germana lingvo oni eĉ skribis **Melodei**, kiu ankaŭ estas retrovebla en la sveda ŝerca formo **melodeja**.

ig

Rilate al **ig** estas malfacile diri, ĉu ĝi estas prenita el la latina **ai** el la germana. Ambaŭ alternativoj ŝajnas same eblaj. La **ig** de kelkaj malmultaj latinaj vortoj ekz. **abigere** (forigi, forpeli), **exigere** (eligi, elpeli), **fatigare** (lacigi) ja evoluis el la verbo **agere** (agi, fari), kiu aperante en neakcentita silabo malfortiĝis kaj vokalmodiĝis.

Multe pli verŝajna estas mia opinio la supozo ke ĝi devenas de la germana, nun vivanta sufikso **-igen**. En la germana oni havas la adjektivan finaĵon **-ig**, kiu ja cetere troviĝas ankaŭ en la sveda. Ordinare oni formas la verbojn el la adjektivoj per simpla aldono de la infinitiva finaĵo **-en**, sed ĉar tiom da adjektivoj finiĝas per **-ig**, iom post iom elkreskis la finaĵo **-igen**, kiun oni perceptis kiel verbigan sufikson, kompreneble komence ekzistanta nur en derivaĵoj de adjektivoj je **-ig**, ekz. **heiligen** (sanktigi), **kräftigen** (fortigi). Sütterlin kaj Waag en sia "Deutsche Sprachlehre" diras, ke ĝi kreiĝis dum la mezepoko. Poste oni ekuzis ĝin ankaŭ je aliaj okazoj, kaj tiel aperis apud la origina **reinen** ankaŭ **reinigen** (purigi). Plue oni derivis el substantivoj: **steinigen** (ŝtonumi, ŝtonmortigi), **peinigen** (turmenti, suferigi), **beëdigen** (ĵurigi, ĵuratesti), **beendigen** (fini, ĉesigi) k. s. Speciale interesa el sveda vidpunkto estas **einhängigen** (ein'händ'ig'en = in'händ'ig'a, länna i handom, en'man'ig'i) kaj la ŝerca **in'mund'ig'a** (en'buŝ'ig'i).

in

Sendube **in** estas prenita el la germana lingvo, sed ĝi estas multe pli internacia. En la angla ĝi estas uzata kelkfoje ĉe titoloj, ekz. **czarina** (carino), kaj ĉe propraj nomoj, ekz. **Georgina**. Same ĝi aperas en la angla **heroïne**, franca **héroïne**, hispana **heroína**, latina **heroína** el la greka **heroïne**. En la latina ĝi cetere aperas tre ŝpare. Plej konata estas eble **regina** (reĝino) el la radiko **reg-** de **rex** (reĝo), komp. hispanan **reina** kaj francan **reine**. Ankaŭ en kelkaj propraj nomoj oni vidas ĝin, ekz. **Agrippina** el **Agrippa**.

il

La plej interesa ŝajnas al mi la sufikso **il**. Ke ĝi aperas ankaŭ en slavaj lingvoj, mi ne sciis kaj dubas ke ĝi estas prenita el slava lingvo. La ruso Varankin ja mencias en "Teorio de Esperanto" ke ĝi estas retrovebla en kelkaj rusaj vortoj sed samtempe prezentas tute nekredoblan supozon, ke ĝi devenas el la hispana, ekz. **martillo** (martelo) k. a.

Mi inklinas supozi ke ĝi devenas de la germana kaj per tio de la tuta ĝermana lingvofamilio. Povas esti ke la germana **Schlüssel** (ŝlosilo) el **schliessen** (ŝlosi) estas la origino. Sed ni komencu per la komenco. La islanda Esperanto-ŝlosilo estas nomata "Esperantó-Lykill". Ankaŭ la sveda "nyckel" estis origine "lykil", formita per la instrumenta sufikso **-il-** el praĝermana **lukan** (fermi), komp. la islandan **loka**. En la sveda restas nuntempe nur la participo de ĉi tiu verbo en la esprimo "inför lyckta dörrar" (malantaŭ fermitaj pordoj). Parencaj al "lukan" estas ankaŭ la svedaj vortoj **lock**, **lucka**, ambaŭ iaj fermiloj.

La instrumenta sufikso **il** de la ĝermanaj lingvoj tamen aperas sub diversaj formoj, kelkfoje i fariĝis e en neakcentita silabo kaj kelkfoje **l** estas antaŭita de **d** aŭ **t**. Tamen la **l** estas konstanta en ĉiuj derivaĵoj. Kelkaj ekzemploj: sveda **nål**, germana **Nadel**, angla **needle**, ĉiuj devenas de iu verbo por kudri (komp. la germanan **nähen**) parencon al la latina **nere** (ŝpini), do: kudr'ilo. Same selo estas svede **sadel**, germane **Sattel**, angle **saddle**, derivitaj el verbo **sidi** kaj sekve signifas simple sid'ilo. Mi eĉ kuraĝas aserti ke la plimulto da svedaj vortoj finiĝantaj per **l**, kiuj estas nomo de la instrumento, enhavas la sufikson **il**. **Tvål** (sapo) el **två** (lavi), do: lav'ilo. **Stol** (seĝo) el **stå** (stari), do origine: star'ilo. Komparu **predikstol** kaj **talarstol**, sur kiuj oni staras kaj ne sidas.

Birger Gerdman.

## 1887—1947

De båda årtalen här ovan minner oss om att sextio år förflutit sedan Esperantos skapare, d:r L. L. Zamenhof, gav världen det språkliga instrument, det utomordentligt storslagna hjälpmedel till förståelse och mellanfolklig samverkan, vars praktiska användning och utbredning esperantorörelsen gjort till sin uppgift att befrämja.

Utan att här minna om de framgångar, som obestriddligen kommit esperanto och den kring språket framväxande folkrörelsen till del överallt ute i världen, och utan att stanna vid kända svårigheter och motgångar — bl. a. två stora världskrig, som i fråga om förstörelse av såväl materiella som andliga värden sakna motstycke i historien — vill förbundsstyrelsen vända sig till esperantosammanslutningarna inom S. E. F:s ram för att rikta allas blickar på de viktiga uppgifter, som ligga framför oss just nu.

Nun aŭ neniam — nu eller aldrig — är parollen inom den internationella rörelsen. Just nu öppna sig oanade möjligheter för esperanto världen över. De gångna åren och alla dess vedermödor får inte avskräcka någon från att nu sätta in ett intensivt propaganda- och skolningsarbete. Detta är varje aktiv esperantists uppgift!

Klubbar, studiegrupper och enskilda kunna göra en betydande insats genom att bland vänner och bekanta men gärna även hos helt utomstående placera årskort om en krona i **A m i k a r o d e E s p e r a n t o** — Esperantofrämjandet —.

Lennart Åberg.

\*

### Relativeco.

La razisto razas sinjoron.

— Kia estas la razilo, sinjoro? — demandas la razisto. — Ĉu ĝi estas akra?

— Tio estas dependa afero, — respondas la kliento. — Se vi razas min, tiam ĝi ne ŝajnas esti speciale tre akra, sed kiam vi ektranĉas min, ĝi estas tre akra.

## Okcident-sveda studkonferenco

Invitas vin la distrikto de Skaraborg.

Sub aŭspicoj de SEF nia distrikto en Skaraborg invitas ĉiujn esperantistojn de la gubernioj Älvsborg, Göteborg kaj Bohus, Jönköping, Örebro, Värmland kaj Skaraborg por Studkonferenco en Skövde la 20—21 de septembro 1947.

La konferenco okazos en Studiegården, Vasagatan 14, Skövde, kie la konferencanoj disponas je prelegejo, manĝejo kaj eĉ loĝejo. Sabate je la 18 h. komenciĝos la kunestado: akceptado, salutparolo, kantado, tesupeo kaj muzika vespero. Dimaĉe matene je la 9 h. matenmanĝo komuna. Poste sinsekve: prelegoj, lunĉo, promenado, prelego kaj intertraktado, diskuto ktp ĝis la fermo de la konferenco je la 17 h, kiam tagmanĝo estos aranĝata por tiuj, kiuj povas resti ĝis la vesperaj vagonaroj.

En la konferenco muzikos kaj prelegos nia franca samideano, s-ro Roland Dupuis el Rouen, kiu en septembro komencos kurslaboron en la distrikto de Skaraborg. Prelegos pri lingva temo gimnazia instruisto, s-ro John Stenström, Ulricehamn, kaj pri instruado de nia lingvo popollerneja instruisto, s-ro Einar Dahl, Uddevalla. Cetere kunlaboros anoj de la invitanta distrikto, reprezentanto de SEF-estraro k. a.

Jen bona okazo por ĉiu esperantisto en la koncerna regiono — cetere la konferenco tre kore invitas samideanojn ankaŭ el la cetera lando — por kolektiĝi en amika rondo, kie oni volas doni valoran kaj inspirodonan programon por la nova studsezono. Petu aliĝilon kun ĉiuj detaloj de s-ro Lars Westman, Mariestadsvägen 3, Skövde.

Ĝis revido en la centro de la verda Skaraborg!

## Mallonge

Dupuis al Skaraborg.

La distrikto de Skaraborg intencas dungi por ses kursoj aŭtune s-ron Dupuis el Francujo. Eventuale li gvidos ankaŭ infankurson por sesa-klasanoj.

Söderberg rektoro de la Somera Universitato.

Laŭ informo de la LKK de Malmö rektoro Söderberg promesis fariĝi rektoro de la Somera Universitato de la kongreso 1948, kondiĉe, ke li tiam estos rektoro de la Esperanto-Instituto.

Filmo pri Svedujo en Bern.

Filmo pri Svedujo estos montrata en kinejo Capitol en Bern ene de la kongresa programo.

\*

La estraro de SEF ĉe sveda registaro petis subvencion de 15.000 kronojn por la aranĝo de la kongreso en Malmö en 1948.

\*

La instruista kunlaboro kun La Juna Vivo komenciĝis per la julia-aŭgusta numero de la gazeto. La instruistan parton redaktas s-ro Korte. S-ro Dahl estas sveda peranto.

\*

La klubo en Kalmar de Försvarsverkens Civila Personals Förbund al sia kongreso en Stokholmo la 2—6 de juni 1947 sendis proponon, ke la sindikato akcelu la enkondukon de esperanto en la internacian laboristan movadon. La estraro proponis malakcepton. Por la propono parolis en la kongreso s-roj A. Magnusson, Nils Bäckelin kaj Gustaf Johansson. Tamen la kongreso malakceptis.

Nu, tiuj, kiuj parolis por esperanto, montris sian komprenon pri la neceso de internacia lingvo. Ke la sindikato entute ne komprenas la aferon, ne estas la kulpo de la proponintoj. Baldaŭ estos tempo ignori tiujn, kiuj ne volas lerni esperanton kaj sole labori laŭ praktikaj esperantaj linioj.

## OPINIO RECENZISTA

Shakespeare: Antonio kaj Kleopatro

(Trad. Stephen A. Andrew. Eld. The Esperanto publishing Co. Ltd. 90 p. Prezo: 2:50.)

La signifo de tiu ĉi proza traduko de la versa tragedio de Shakespeare, ke ĝi povas servi kiel bonega helpilo de tiuj, kiuj deziras legi la dramon en originalo, aŭ kompari nacilingvan tradukon kun la originalo tra la fidela esperanta traduko. Tia klopodo estas tre estiminda kaj sendube utila; la tradukinto tiurilate solvis sian malfacilan taskon entute laŭdinde. Sed estas alia afero, kiu principe kontraŭdiras la prozan tradukon de poezia verko el la vidpunkto de la meza leganto kaj tio speciale aperas, se temas pri la lingvo de Shakespeare. **Tiu lingvo estas natura kiel poezia lingvo**, sed en prozo ĝi fariĝas ia baroke plenŝargita stilo; la solena mantelo de la poezio bone konvenas al la ŝekspira dramo, la sama lingvo en prozo vekas fremdan senton kaj speciale komence pli baras ol helpas la rulon de la okazaĵoj. Kun tiu principa rezervo oni povas laŭdi la tradukinton kaj ĝoji, ke tia "fontverko" ekzistas. Kelkloke tamen la traduko prezentas tiajn malfacile kompreneblajn partojn, kiujn alinacia reviziinto facile estus povinta astataŭigi per pli kompreneblaj esprimoj.

F. S.

Thèvenin: La Vana Kanto. Versaĵoj. Eldonis "Kompreni", Lyon, Francujo.

Malgraŭ tio, ke la tekniko estas ne malbona — la versoj fluas glate kaj senĝene — oni tamen ne povas ne demandi al si kun miro, kio estas la senco kaj celo publikigi tiaĵon. Mankas vera enhavo, mankas la poezio, la poeta talento kaj inspiro. Entute la versaĵoj lasas almenaŭ min tute netuŝita, neemociita. Tipaj ekzemploj estas La velo, pĝ 21, Noktiĝo, pĝ 12, La noktuo, pĝ 13. Kial oferi paperon kaj presnigraĵon por tiaj versaĵoj? La sola peco, kiu iomete min interesas, estas La fonto klara, pĝ 17, kiu efektive havas ion komunan kun popolkanto.

Kantoj kun muziknotoj sur poŝtkartoj. Eldonis Kompreni, Lyon.

La kantoj estas simple teruraj el lingva vidpunkto, laŭ mia opinio. Kion oni diru pri:

"Tra la montoj, tra la kampoj  
gaje marŝis kun uldu', kun uldu'?"

Aŭ pri

Ni ĝoje sonigu  
kun kuna la kant'?

Kiu sonigu? Ni aŭ la kant'?

Aŭ pri

al iu nun nova kaj fora la land'?

Bigo.

## DAN — SVEDA ESPERANTOTAGO 1947

okazos en HÄLSINGBORG

Dimanĉe la 7:an de sept. Kolektiĝo ĉe la pramo je la 11.00 h.

Speciala programo laŭ peto ĉe Skania Esperanto-distrikto, Kamrergatan 3, Malmö.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn

La komitato.

Ne imponas...

Mi tute ne scias, — diras sinjoro — kial oni fanfaronas tiom pri Mozart! Nu bone, li komponis la operon Traviata, sed kion ankoraŭ.

— Pardonu al mi sinjorino — interdiris modeste iu vira voĉo, — la operon Traviata ne komponis Mozart!

— Nu, ĉu vi vidas, — respondis la sinjorino kun ŝultromovo, — eĉ tion li ne komponis...

# ENTUZIASMO PRI ALAMO

Brno, 25.6.1947

Tre estimata samideano!

Kiel estron de Sveda Esperanto Federacio ni permesas al ni informi vin koncize pri la sukcesplena vizito de via samlandanino samideanino Anna Alamo en nia urbo pasintan semajnon.

S-ino Alamo alvenis en Brno la 18.6 tagmeze kaj forveturis la 20an matene. Dum unu kaj duontaga restado en nia urbo ŝi faris plej efikan propagandon por nia komuna afero kaj por sveda-ĉeĥoslovaka amikeco.

Jam merkrede postagmeze vizitis s-ino Alamo en akompano de Brnaj samideanoj la infanajn ludojn okaze de t. n. Ĝojsemajno antaŭ la lerneja jarfino. Ŝi estis ĝojege akceptita de la instruistaro kaj de la lernantaro. La skanditajn salutojn de ĉeĥaj infanoj al svedaj infanoj respondis s-ino Alamo per elkora kaj kortuŝa alparolo. Sekvis invito al ĝardeno temanĝo, enskribo en honorlibron, gratulo de direktoro de la lernejoj. Esperantajn alparolojn lerte tradukis s-ano Korínek.

Vespere komuna kunesto de Brnaj esperantistoj en kafejo Zeman. La sekvintan 19an de junio oni intensege eluzis. Tuj matene je la 9.30 h oni surbendigis en Radio Brno intervjuon kun s-ino Alamo esperantlingve kun ĉeĥa traduko de s-ano Vítek (Jelg). Tiu ĉi 4-minuta intervjuo estis samtage vespere disaŭdigata kaj per radio-ricevilo antaŭ la prelego en la universitato por la plena ĉambrego dislaŭtigita, kion oni aplaŭde akceptis. El la radiostacio oni veturis rekte al la granda kinejo Metro, kie jam ariĝis pli ol 700 gestudentoj de du ŝtataj komerc-akademioj kun la profesoroj. Per vortoj trafaj, per sia senpera, elkora, malafekta parolo ravis s-ino Alamo la gejunulojn kaj post la fino aŭdiĝis neĉesanta entuziasma aplaŭdo. La direktoro emociita kaj forte kortuŝita interpretigis sincerajn dankojn por tiuspeca, neofte aŭdebla, parolado kiu tiel evidentigis al ni la noblan agadon de la sveda popolo dum la milito, ĝian veran rolon de savanto al multegaj militmizeruloj kaj rifuĝantoj kaj la grandan sinceran helpon de Svedujo al malsatantaj landoj post la milito. Fine la direktoro per mankiso esprimis sian eksterordinaran dankemon por la belega prelego. Fidge tradukadis s-ro Vítek, aldonante sian lumbildparoladon.

Postagmeze samideanoj el Brno peraŭte veturigis s-inon Alamo la la proksimaj stalagmitaj grotoj kaj abismo Macocha. Kaj vespere denove belega prelego ĉe la filozofia fakultato de la Masaryk-universitato. Kvankam dum varmega somera vetero la prelegoj en la fakultato samkiel aliloke, estas nur sporade iom pli bone vizitataj, surprize estis jam antaŭ la komenco la ĉambrego plenplena kaj multaj devis foriri. La parolo estis same efika kaj ĉies koron tuŝanta. Estas ja malofta donaco de dio per simplaj vortoj scipovi la homojn tiel ravi kaj impresi. Ĉi tiun prelegon kunaŭskultis multaj esperantistoj el Brno. Bonege tradukis prezidanto de Brna E. klubo s-ro Vondroušek. Forta aplaŭdo rekompencis s-inon Alamo kaj vortojn de s-ano Vítek. Kortuŝa estis momento kiam du ĉeĥaj infanoj kiuj estis gaste en Svedio en kadro de la svedohelpo, bonvenigis s-inon Alamo kaj ĉeĥa knabino etendante rozbukedon alparolis svedlingve s-inon Alamo.

Domage, ke 36 horoj de ŝia ĉeesto tiel rapide forpasis. S-ino Alamo faris al ni valoregan servon, bonan laboron por Esperanto kaj ni petas vin post ŝia reveno transdoni oficiale ankoraŭ al ŝi niajn korajn dankojn. Laŭ aserto de s-ro Vítek estis la sukceso de prelegoj de s-ino Alamo ankaŭ en ĉiuj aliaj lokoj same eksterordinare granda.

Ni gratulas al Sveda Esperanto Federacio ke ĝi trovis tiel indan kaj bonegan prelegistinon kaj reprezentantinon.

Kun samideanaj salutoj  
por ESPERANTISTA KLUBO EN BRNO  
Jirí Korínek, sekretario.



Sinjorino Anna Alamo

## I. A. P. K.

### Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj

#### Vet Ni

- att alla frimärkssamlare har fördel av medlemskap,
- att alla dupletter tills vidare emottagas utan retur, men att utbytesmärkena dock fritt får utväljas,
- att I. A. P. K. förbereder utgivandet av en frimärkskatalog på esperanto,
- att första delen, England, utkommer inom kort,
- att I. A. P. K:s medlemmar har facksammanträde under kongressen i Bern,
- att medlemskap, inkl. abonnemang å internationell tidning, till årets slut kostar endast 2,50 sv. kr.,
- att alla upplysningar lämnas omgående och portofritt av generalagenten för Sverige, Bertil Zell, Box 5085, Göteborg 5.

## LIBERA DEBATO

Tute ne dezirante min enmiksi en la diskuton inter sinjoroj Butler kaj Salex, mi tamen ne povas ne atenti sinjoron Butler pri la ekzisto de la Esperanta radiko **kast**, oficialigita en la Unua Aldono al la Universala Vortaro. Ĝin registras eĉ la vortaro de Millidge, kiu tradukas ĝin per **caste**. — Birger Gerdman.

#### Amika dialogo.

- Mi aŭdis, ke vi ĉie diskonigis, ke mi estas idioto!
- Pardonu, mi ne sciis, ke vi konsideras ĝin sekreto,

## Propaganda numero?

La ĉefo de Eldona Societo kaj kejkaj estraranoj de SEF decidis, ke mi faru por septembro propagandan numeron, kaj poste la nomitaj sinjoroj veturis al la Berna kongreso, lasante min en embaraso pri la enhavo de tiu propaganda numero. Nu, certajn planojn ni diskutis. La numero temu pri kongresoj. Pri la racileco kunsidi kaj paroli en internacia esperanta kongreso, kaj pri la malfacileco kompreni en multlingva nacilingva kongreso.

Sed de kie havigi materialon por tia propaganda numero? Mi ne scias. Sed vi, kara leganto, povas helpi. Vi sendu al mi raportojn pri la kongresoj esperantaj, kiujn vi partoprenis, kaj se vi partoprenis nacilingvajn kongresojn, bv ankaŭ raporti. Sed pri la nacilingvaj kongresoj, kaj pri kunsidoj de potencaj ŝtatviroj, raportas la gazetoj. Se vi nun ĉiuj estas tiel afablaj, ke vi sendos al mi tondaĵojn pri tiaj kongresoj kun prikskriboj pri la lingvaj malfacilaĵoj kaj pri la interpretaj komplikajoj, tiam ni eble havos propagandan numeron.

Alia afero, nepre atentinda: Vi devas antaŭmendi la propagandan numeron! Antaŭ la 25-a de aŭgusto via mendo devos esti ĉe Eldona Societo Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19. La prezo estos pli alta ol pasintjare, pro la tiama deficitito. Nun 100 ekz. de la numero kostos 18: — kr. La venda prezo estu 25 öre. Jes, do, antaŭmendu! **Red.**

## La unua norvega somerrestado esperantista

okazos en la belega Lofthus en Hardanger de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto.

Hardanger estas la plej bela loko en la okcidenta Nordvegujo. Ĉiuj elementoj de l' norvega naturo troviĝas tie en plena harmonio: fjordoj, valoj, montoj — parte kun eterna neĝo sur la suproj — lagoj kaj ŝaŭmantaj akvofaloj.

La restadejo — popola altlernejo — situas kiel perlo ĉe la bela fjordo. Leviĝas la montaro kun eterna glaciario.

Dum la restado estos aranĝataj pluraj interesaj ekskursoj al vidindaj lokoj en la proksimo, ekz. al paŝtistejo surmonte kaj al la dua plej alta akvofalo en Nordvegujo.

Vidu reklamon en la antaŭa numero.

## Esperantaĵojn sendu al ekspozicio

En la komenco de septembro okazos en la urbo Plovdiv en Bulgarujo granda specimenfoiro, en kiu partoprenos dek landoj.

Pro tio la Plovdiva esperanta societo "Kulturo" aranĝos en la foiro pavilonon kun speciala esperanta ekspozicio por propagandi la esperantan ideon kaj movadon. Tiucele ni nin turnas al la tutmonda samideanaro kun peto pri helpo per alsendo de esperantaĵoj, kiel ekz. gazetoj, libroj, ĵurnaloj, fotoj, leteroj, poŝtmarkoj, ilustraĵoj ktp. Ni ankaŭ ĝojus, se la samideanoj nin persone vizitus.

Dum la sama tempo, la 6—7-a de septembro, en la urbo Plovdiv okazos al XXX-a jubilea kongreso de la bulgaraj esperantistoj, kaj Balkanlanda Esperanto-konferenco.

Bv vin turni al s-ro Ivan T. Savov, Volga 38, Plovdiv, Bulgarujo.

## Internacia Ekspozicio de Infanaj Desegnaĵoj

La Esperanto-Societo de Lyon preparas ekspozicion de infanaj desegnaĵoj. La celo estas montri, kiel infanoj vidas sian landon. Tial la desegnaĵoj prefere prezentu tipajn pejzaĝojn, aŭ scenojn. Formato 21×27 cm. La aĝo de la infanoj estu maksimume 14 jaroj. Sub ĉiu desegnaĵo oni klare menciui: nomon, aĝon, adreson, kaj eventuale la lernejon.

## Petro Digan

El la verkaro "Ĉasaventuroj" de Stefano Bársony.

La tuta vilaĝo malesperis jam, ĉar estis ja tro multe, kion la nigra sovaĝporkaro kaŭzis. Se la afero tiel daŭrus, post kelkaj semajnoj, kiam oni povus rikolti la maizon, restos nenio alia, krom maizostumpoj.

La arbargardistoj ĉiutage pli laŭte publikigis, ke la apraro jen ĉi tie, jen tie troviĝis. La vilaĝestro ĉiutage pli kolere elpelis ilin, ne povante helpi en tiu malbono. Al la dentegularo oni ne povis simple per tamburado konigi la malpermeson, ili mem disponis laŭ siaj stomakoj en la rikoltafero de la vilaĝanoj. Ankoraŭ pligrandigis la embarason, ke krom Petro Digan ne ekzistis pafilhavanto en la vilaĝo, ĉar ĵus tiutempe oni enkondukis la ĉas-kaj pafilimpostojn, pro kio la plimulto de l'ĉasistoj tiagrade ektimis, ke unuj vendis, aliaj disrompis siajn pafilojn, por kiuj ne estis inde pagi 2 florenojn.

Ili poste, kiam malfermiĝis la okuloj de la ektimintaj homoj, vidante, ke tiu ĉi leĝo estas ankaŭ nur tia leĝo, kiaj la ceteraj, ekzistantaj simple nur, por ke la homoj, havantaj pli memstaran opinion, superruzu kaj mistifiku ĝin, ankaŭ reaĉetis la mortiginstrumentojn. Aĉetante novan pafilon, ili ne kontentiĝis je la malmoderaj, tielnomataj "porkpiedoĵoj", sed elektis malantaŭe ŝargeblajn pafilojn, kiujn oni tre facile povis dispecigi, kaŝi en la fojnon de la veturilo, por ke la ĝendarmoj kaj la financ-kontrolistoj ne ekvidu ilin. Sed provizore, mi diras, neniu havis pafilon, krom la riĉa Digan, sed liaparte leporoj, vulpoj trankvilanime povis maljuniĝi, ĉar li ne estis ĉasisto.

(Daŭr. en la sekv. paĝo.)

La ekspozicio okazos en la venonta aŭtuno, en "Palais du Conservatoire", kie okazos ĉiuj artaj ekspozicioj. Grandaj tabuloj klarigos, kiel Esperanto permesis la kolektadon. Poste la societo metos la tutan materialon je la dispono de aliaj esperantaj grupoj.

Sendu la materialon al la prezidanto de la Lyona Esp. Societo, s-ro Richard Levin, 55 Avenue Félix-Faure, Lyon, Francujo.

### La singardema fremdulo.

En la vendejon de la ĉefa strato de amerika vilaĝo eniras fremdulo.

— Ĉu tiu ĉi vendejo estas la sola en via vilaĝo?

— Jes, sinjoro!

— Ĉu vi havas putrajn ovojn?

— Ho jes, mi havas kelkajn. Kiom vi deziras?

— Ĉiujn, kiujn vi havas.

La komercisto enpakas kaj transdonas ilin.

— Diru al mi, — reparaĵis la fremdulo — ĉu mi povus ankoraŭ ie en la vilaĝo ricevi putrajn ovojn?

— Ne sinjoro, nenie vi povas ricevi, — respondis la komercisto. — Se mi ne eraras, — li aldiris — vi volas iri hodiaŭ al la teatra prezentado de Hamleto?

— Dio min gardu! — sed mi mem volas ludi la rolon de Hamleto.

## GRAVA INFORMO!

### Por via korespondanto

ni pretigis specialan presajon. Vi, kiu havas korespondantojn en diversaj landoj, tuj mendu sufiĉan kvanton por ke vi transsendu po unu ekzemplero al viaj geamikoj. Vi ricevas la novan presajon tute senkoste. Skribu hodiaŭ al Sv. Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm, kaj petu la bezonatan nombron da la nova NVR-presajo.

Grave! Petu tuj la presajon, kiu estas farita ĝuste por viaj korespondantoj.



Tiufoje tamen ankaŭ lin oni vekis el la kompleta indiferenteco. La popolo ne lasis lin trankvila, instigante lin, ke li iru do fine kaj pafadu je amaso la tutan domaĝigan porkaron. Oni igis lin kredi, ke li, eĉ nur unufoje ekpafigante la pafilon, almenaŭ dekduon el la aproj surterigos, ĉar ili estas tiel multnombraj en la maizo, kvazaŭ paseroj. La gardistoj ĉiutage vizitis lin por konigi al li la Hiob'an famon, ke laŭvice sekvis jam la maizokampo de lia najbaro Kristja kaj hodiaŭ tiuj bestaĉoj tute certe festenos en la ĉinkventeno<sup>1</sup> de Petro Digan.

Malvarmo trakuris la tutan korpon de Petro Digan je tiuj vortoj. Nun ja ŝajnis al li, ke ankaŭ en la fundo de lia propra animo eksonis la batalalarmo. Li mem estus konsiderinta nepardonebla malkuraĝo, se li eĉ nun rifuzus fari ordon en tiu ĉi malordo. Li diris nenion, nur kapjesis, sed la plano jam estis preta en lia kapo. Li jam decidis, ke post krepuskiĝo li entreprenos ion, kion rememoros eĉ la nepoj.

La gardistoj furioze foriris de li, precipe unu, kiu jam centfoje insistis, ke li pruntedonu la pafilon por moralinstrui tiujn bestaĉojn, sed Petro Digan persistis rifuzi, mem proklamante la sperto-instruon de l'proverbo, laŭ kiu "virinon, pafilon kaj ĉevalon oni neniam konfidu al aliaj".

..... Kaj, post kiam la suno subiris, kaj la ruĝaj radioj kolorigis la verdon de la monteta ĉeno, kovrita de densa arbaro, Petro Digan envolvis sin en sian pli longan pelton kaj ŝteliris tra sian ĝardenon el la vilaĝo al la maizokampo.

Li ne devis iri longan vojon. La maizokampo, abunde riĉa je ankoraŭ subtila maizo, apenaŭ estis pli ol duonhoron malproksime de la vilaĝo, ĝuste apud la arbarrando. Se li transiris la herbejon, transvadis la rivereton, li povis jam aŭdi la susuron de la sukplenaj, verdaj maizfolioj kunfrotiĝantaj en la vento jen ekblovanta, jen ree ĉesanta.

Lia kampo troviĝis ĉirkaŭume en la mezo de la maizparceloj alternantaj kun aveno. Ĉe la flankoj al la vilaĝo kelkaj prunelarbetoj interplektiĝis, formantaj naturan kaŝejon al la kuraĝa ĉasisto. Digan ekrigardis la ĉielon kaj konstatis el la luniro proksimume la naŭan. Li sin retiris en la prunelajon kaj ŝargis kviete la pafilon.

Kiu ne ekkutimis la noktan solecon ekstere sur ia kampo, apud arbaro, kie ĉiuspecaj strangaj sonoj, voĉoj, tage neniam aŭdeblaj ekkrioj, muĝadoj, murmuroj, ĝemoj teruras kaj timigas, tiu ne povas imagi, kian transformiĝon travivas tiaokaze eĉ sendifekta nervaro de kuraĝulo. En la aero estas io sufokanta, malkvietiga; la karbonacido elspirita de la vegetaĵaro, kvazaŭ inkubo premiĝas sur la koro; la vesperton, super ni preterflirtantan, ni imagas fantomo, la ĝemkrion de l'arbara strigo ni opinias la helpkrio de homo agonianta inter la manoj de sufokanto.

Al Petro Digan ne estis tiaj aĵoj novaj, tamen li ne fartis bone. La sola malbonaĵo estis, ke li sin juĝis en tiu ĉi momento troege danĝera homo kun tiu ŝargita pafilo, kaj samtempe komencis esti tute evidente al li, ke serioza afero donis en liajn manojn la mortigilon.

Kiamaniere estos, se venos la porkoj?

..... Li atentos, ĝis kiam ĉiuj kuniĝis en granda amaso; verŝajne tie sur la maldensejo ili malsupreniĝos, kie la sovaĝa trifolio traigis. Estas iomete malproksime, sed tiom pli bone, ĉar tiom plie disjetiĝas la kugletaĵo, kun kiu la pafilo estas ŝargita. Jen! tiel li celos! ..... Jen! tiel li ektiros la pafilon! .....

Terura tondro vibrigis la aeron; tre malmulte mankis, kaj Petro Digan estus dorsfalinta. La malfeliĉulo kun streĉita ĉeno provis sian pafilon kaj ektirante la pafilon, ĝi malsargiĝis.

Iomtempe li eĉ ne povis rekonsciiĝi el la konsterniĝo, sed iom post iom li tamen regajnis sian prudenton kaj tre ekscitite reŝargis sian pafilon.

Post tia akcidento, eĉ nur iomsperta ĉasisto estus malesperinta; je tiu ĉi bombardado ĉiu espero devis ja nuliĝi en tiu ĉi nokto. Sed Petro Digan ne estis ĉasisto kaj eĉ Sankta Huberto faris escepton al li kaj pardonis lian senrutinecon.

<sup>1</sup> Speco de maizo kun etaj grajnoj.

Apenaŭ li staris en la prunelajo mallongan horon, kiam fortaj spirblovoj kaj maĉado aŭdiĝis el la arbaro. Ho! Jen la porko!

Mi ne asertas, ke oni nepre devas ektimi, aŭdante tiajn sonojn, sed aliparte mi mem spertis, ke la okazĉasistoj tre malofte suportas senfibre tiaspecajn situaciojn. Estas efektive io spirsufoka, kiam en plena noktsilento subite la breĉo ekknaras, ekkrakas kaj aŭdiĝas la raspo de la disrompiĝanta junkreska arbeto en la irvojo de la surpaŝanta, alfrotiĝanta bestego. Kelkfoje ĝi forte spirblovas en la densaĵo, poste tre longe atentis; trovinte fungon, ĝi ŝmacante, kvazaŭ delikataĵon konsumas ĝin kaj ekiras al la arbarrando, kie la delikata maizo ĝin allogas.

Petro Digan denove balancis la kapon kaj liaj okuloj preskaŭ elsaltis, tiel intense li rigardis en la direkto al la spirblovoj.

La krakbruo de movoj estis aŭdata jam de multe pli proksime; oni povis jam klare konstati la rompo-bruon de la maiztrunkoj, kiujn iu porko paŝo post paŝo ekrompis. Ĉu ĝi estas la sama, kiu ankoraŭ kelktempe antaŭe ŝmacis en la arbaro, aŭ estas eble alia ano de la dentegularo, kiu — sole Dio scias — el kiu direkto enŝteliĝis en la maizon?

Aŭdiĝis jam akresona krio el la maizo. Tie la aproj jam intermordiĝis. Ili sin ektrovis kaj la maljuna subite dentfendis la junan.

La gorgo de Digan kunpremiĝis, kaj laŭ ebleco, li pli bone kaŝis sin inter la prunelarbetoj. Treege lin malkomfortigis la pafilo, li do malstreĉis la ĉanon kaj entiris la armilon sub la longan pelton. Cetere, lin pleje komencis jam ĉagreni, ke li kunprenis la pafilon, kiu ja nur malhelpas lian pli liberan movon.

Senĉese li intense disstreĉis la palpebrojn de siaj okuloj, ĝis kiam li fine pro trouzo efektive nenion vidis. Tiel blindiĝinte, ŝajnis al li ankoraŭ pli terura la perdentega lukto kaj gruntado de la porkoj. La tuta ĉirkaŭaĵo kvazaŭ kunfandiĝis, kaj nur ia nigra vibraĵo dancadis antaŭ li, kaj el tiu ĉi malluma purgatorio senhalte aŭdiĝis la dolorkrioj de la malbenitaj animoj.

Digan kelkmomente mem estis ema konkure kii kun la ploregantoj; iom post iom plie tremadis lia dentaro pro timo kaj kiu scias, kia malfeliĉo estus lin atinginta, se en la lasta momento Dio ne estus doninta al li savantan ideon.

Tiel silente, kiel li nur sukcesis, li kuŝigis la pafilon sur la herbon, sursternis la pelton kaj tiamaniere liberigita de tiom da senutilaj, eĉ malhelpaj objektoj, kvarpedule, kun treega singardemo li komencis la sinretiradon.

Kun neesprimebla angora singardo li rampis trans la tutan herbejon, senĉese timante, ke la luktantaj porkoviroj lin rimarkas; sed pensante, ke li jam tute povas fidi la krurojn, li subite eksaltis kaj ekkuris tiel rapide, ke li preskaŭ rompintis sian nukon, falante trans la rivereton.

La sekvantan tagon tagmeze efektive raportis la gardisto:

— Nu vidu, ĉu mi ne diris, ke la aproj formanĝos vian maizon?

Petro Digan balancante la kapon, rezignacie murmuris je sia elokventa dialekto:

— Sendube ĝi formanĝas, se ĝi estas malsata.

Tradukis:

Francisko Engelmann.

#### La eterna fraŭlino.

— Vi do, kara Georgo, — diras la patro al sia filo, — volas edzinigi tiun ĉi operetaktorinon!

— Jes paĉjo, — respondas kun defendema mieno la filo, aldonante:

— Mi esperas, ke vi ne diros malbonon pri mia fianĉino!

— Ho tute ne! — diras trankvilige la patro, — sed konfesante la veron, kiam mi estis en via aĝo, ankaŭ mi volis ŝin edzinigi!

**RADIO****ĈIUTAGE:**

16.30—16.45 Praha 31,41 m kaj 1935 m.

22.00—22.15 Praha 49,92 m.

En ambaŭ la supraj sendoj de Praha raportoj ĉiuspecaj. Ĉiunonate ankaŭ informo pri la esperantista vivo en Ĉeĥoslovakujo. La enhavo de la du sendoj estas malsama. Adreso: Esperantoservo de Radio Praha, Stalinstrato 12, Praha XII.

**LUNDE:**

21.50—22.00 Praha I 470 m. Tre varia programo.

23.30—23.35 Budapeŝt I 550 m. Informoj. — Hungara Radio, VIII. Bródy Sándor u. 7, Budapeŝt, Hungarujo.

**MARDE:**

19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Informoj el Bulgarujo. — Radio Sofia, Esperantosekcio, Sofia, Bulgarujo.

21.50—22.00 Ostrava 260 m. Aktualajoj en Ĉeĥoslovakio. Leterkesto. — Esperantoservo de la Radiostacio, Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

**MERKREDE:**

06.35—06.45 Wien I 506 m. Esperantokurso. — RAVAG-Wien, 30a Argentinierstrasse, Wien IV, Aŭstrio.

21.10—21.25 Warszawa III 49,06 m. Politikaj informoj. — Esperantosekcio de la Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa, Polujo.

23.30—23.35 Budapeŝt I 550 m. Vidu sub Lunde.

**JAŬDE:**

17.50—17.55 Wien II 31 m, 41 m kaj 228 m. Inform-servo.

18.45—18.50 Bern 31 m (47,28 m kaj 200 m?). Federalismo kaj paco, paroladetoj de dro Edmond Privat.

21.50—22.00 Praha I 470 m. Vidu sub Lunde.

**VENDREDE:**

19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Vidu sub Marde.

21.50—22.00 Ostrava 260 m. Vidu sub Marde.

23.30—23.35 Budapeŝt I 550 m. Vidu sub Lunde.

**SPORADE:**

1/8 je 19.15—19.30 Hilversum I 301 M. Du renkontoj, religia progr.

2/8 je 16.10—16.25 Hilversum II 415 m.

6/9 je 16.10—16.25 Hilversum II 415 m. Adreso Radio-V. A. R. A., Postbus 175, Hilversum, Nederlando.

25/7—3/8 ĉiutage je 18.00—18.10 Scharzenburg, Svisujo, 31,46 kaj 48,66 m raportoj en esperanto pri la kongreso.

26/7 je 16.00—? Beromünster. Intervjuo kun kongresanoj.

\*

En la "naskiĝotago" de la Lingvo Internacia, la 14an de julio, la norvega radio elsendis norveglingvan paroladeton de kapitano R. Bugge-Paulsen, kun la titolo "Esperanto 60-jara". Oni disponigis 10 minutojn al la okazaĵo (la skandinaviaj radistacioj estas ja ĉiam malavararaj pri sia tempo, kiam temas pri Esperanto. Kapitano "Robopo" estas brava viro kaj li prenis du kromajn minutojn, kiujn li nepre bezonis por propagandi la UNO-peticon, kiam li foruzis la donitan tempon por sia lerta skizo pri la hodiaŭa stato de la help-lingva problemo.

**Mi serĉas kontakton**

kun svedo, kiu emas sendi svedajn poeziaĵojn por ĉeĥoslovaka literatura revuo. Skribu al s-ro Pavol Števtat, Dvorníky, distrikto Krupina, Ĉeĥoslovakujo.

**Mi ĉasas mallong-ondajn staciojn**

Vi povas fari vere efikan internacian propagandon por esperanto kaj samtempe havi tre interesan, distran okupon, kiu donas konkretan rezulton. Fariĝu "DX-ano."

Iam mi estis malsana kaj sidis hejme ĉe mia radio-ricevilo. Mi aŭdis plurajn interesajn staciojn. Inter aliaj Radio Brazzaville, VLA en Aŭstralio, PCJ-Hilversum ("Feliĉa Stacio") kaj kompreneble Praha.

Jam antaŭe mi sciis, ke ĉiu radiostacio de mallongaj ondoj tre interesiĝas pri raportoj de la aŭskultantoj, precipe de tiuj, kiuj loĝas malproksime de la sendstacio. Mi skribis en esperanto al tiuj stacioj (kvankam ne temis pri esperanta dissendo) kaj sciigis al ili pri la forto, la aŭskulteblo, la perturboj k. c. pri la sendita programo. Kiel respondon mi de ĉiuj ricevis atestkartojn, spite de la fakto, ke mi skribis en esperanto. Nun mi havas multajn tiajn belajn kolektaĵojn.

Kiam radiostacio ricevas esperantoleteron, devas okazi aŭ ke ili transdonas ĝin al esperantisto por traduko, aŭ ke ili klopodas traduki ĝin mem, aŭ ke ili eĉ ne provas traduki ĝin. Ĉiokaze ili respondas. Sekve ili devas rigardi ĝin.

Se la stacioj ricevas multajn tiajn aŭskultraportojn en esperanto, ili iom post iom devas kompreni ke ekzistaj homoj, kiuj uzas tiun lingvon. Ili eble eĉ kredas, ke utilas por ili fari disaŭdigojn en esperanto. Bona propagando por ni. Do, fariĝu "DX-ano". Sendu multajn raportojn en esperanto al la mallongondaj stacioj. Sed memoru ke vi ofte longtempe devas antendi, antaŭ ol vi ricevas respondon. Tamen vi tian ricevas.

Li.

**Nia aŭgusta konkurso**

Bienulo posedis ŝafojn kaj kokinojn, kiuj havis sume 68 kapojn kaj 200 piedojn. Kiom da ŝafoj kaj kokinoj estis?

La problemo estas facile, tro facile, solvebla per algebra ekvacio. Do, via tasko estu, elpensi kaj montri aritmetikan manieron solvi la problemon.

Solvojn, sur aparta papero kun via adreso, antaŭ la 15-a de septembro sendu al Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V.

Ĉar la limdato de nia junia konkurso estas 15.8.47, ni ne nun povas informi pri premiogajntinto.

La ĉimonatan problemon sendis s-ro Hannes Koivu, Helsinki. Koran dankon!

**La rezervita sidejo.**

Boieldieu, la fama franca operaŭtoro, havis konstantan liberan sidlokon en la Théâtre Français, sed dum jaroj tute ne okupis sian lokon.

Unu vesperon Boieldieu, ne havante alian programon, iris en la teatron. Kiam li nomis sin, frakvesta, seriozmiena sinjoro severe rigardis lin de la verto ĝis la plando, dirante:

— Ne volu nin mistifiki, sinjoro! Ni tre bone konas sinjoron Boieldieu; ĉiuvespere li sidas en la teatro sur sia rezervita sidloko. Jus nun li estas enirinta.

La aŭtoro ne kontraŭdiris, eĉ tre modeste esprimis sian intencon, ke li deziras aĉeti la bileton por la apuda sidloko.

Dum la interakto la vera Boieldieu alparolis sian najbaron:

— Ĉu vi estas efektive sinjoro Boieldieu, la muzikaŭtoro?

— Jes, — respondis la alia.

— Ĉu vi estas tute certa pri tio?

— Sed sinjoro!... — embarasiĝis iom la trudemulo.

— Mi demandis nur pro tio, ke mi surpriziĝis iomete, — diris Boieldieu ridante. Nome mi, depost proksimume 50 jaroj opiniis, ke mi estas Boieldieu.

## Nia rondo familia

### MORTIS.

Kiel fulmo de sennuba ĉielo venis informo pri la morto de nia klubmembro Harry Wall la 17-an de julio. Li fariĝis nur 35-jara.

Ĉe nia lastfoja kunsido li plendis ke li ne estas tute sana. Tamen oni ne povis kredi, ke la granda ekziĝo estas tiel proksima. Multon el tio, kio okazas, ni ne povas kompreni per nia nesufiĉa tera menso. Nur restas por ni, nin klini antaŭ la sorto. Harry aktive partoprenis nian movadon. Nun li ne plu estas inter ni, sed li vivos en nia memoro.

H-ger.

## Korespondu

S-ro F. G. Tuck, West Walls House, Wareham, Dorset, Anglujo, kriplulo, deziras korespondi kun ĉiulandaj kripluloj kaj malsanuloj por komnuaj interesoj.

## Anoncetoj

S-ro S. A. Klukowski, 3233 S. Springfield Ave., Milwaukee 7, Wis., USA, en letero al la redakcio petas pri publikigo de peto pri senkulpigo al li, ĉar li ne respondis leterojn el Svedujo, Norvegujo, Danlando, Finnlando ktp. La kaŭzo de la mankantaj respondoj estas, ke s-ron K. atakis kormalsano en marto, kaj de post tiu tempo li devis ripozi. Li esperas povi fine de aŭgusto repreni sian laboron.

\*

En Popola respubliko Bulgario jam aperis jubilea Esperanta poŝtmarko, dediĉita al la 60-jara jubileo de Esperanto, al la 30-jara datreveno de la morto de Zamenhof kaj al la 30-a jubilea Bulgara Esperanto-Kongreso. Nominala prezo = 20+10 levojn. La eldonkvanto estas limigita. Prezo por 1 ekz. = 2 int. respondkup., por 2 ekz. = 4 int. rpk ktp. Aldonu por afranko kaj rekomendo du pliajn kuponojn. Por afranko kun la esperanta marko mem oni aldonu 4 rpk. Tuj mendu la valoran markon ĉe la redakcio de "Internacia Kulturo", str. Alabin 33, Sofio, Bulgario.

### Esperanto gajnis konkurson.

Politikens Forlag en Kopenhago antaŭ kelka tempo aranĝis premikonkurson. La tasko de la partoprenantoj estis, rakonti plej bone pri la plej interesa hobia. Multaj hobiaj provis rakonti interese pri siaj amĉevaloj. Plej bone tamen sukcesis instruisto Poul Thorsen, Bangertsgade 8, København N., kiu gajnis la unuan premion. Li ricevis kreditbileton je 200 kronoj, por kiuj li aĉetu akcesoraĵojn laŭ libera elekto por sia hobia, esperantostudado kaj esperantomovado.

## Svenska Esperanto-Tidningen

### La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund

Redaktör: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V. Tel. 29 03 81.

Prenumerationspris. Helt år (12 nr) kr. 4:— . Lösnummer: 0:40. Eksterlanda abono kr. 4:50 aŭ 15 int. respondkuponoj.

Annonspris: 0:20 pr mm. Korrespondensannons: 1:50 (aŭ 5 int. respondkuponoj).

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto (se nedan).

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a. Postadress: Fack 19071, Stockholm 19. Expedition: Sveavägen 98, VI. (Kl. 19—21.) Telefon: 31 65 01 (förlagschef 50 88 05). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar m. m.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio), Cefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:50; Membro-Abonanto 9:—; Membro-Subtenanto 18:—; Patrono 90:—.

### Familia priparolo.

— Mia Frederiko, — diras la edzino — la kareco kaj la prezoj ĝenerale, de tago al tago plialtiĝas. Ni devas nepre ankoraŭ pli multe ŝpari, ol ĝis nun. Kion vi povus plej facile malhavi?

Al kiu demando la edzo senhezite respondis:

— Vian karan patrinon.

**Manuskriptoj por numero 9 atingu la redaktoron plej laste je la 20. 8. 1947**

# Y T O N G

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.**  
**Hällabrottet**

# REDAN NU SÄTTER VI IGÅNG MED FÖRBEREDELSENA FÖR HÖSTENS KURSER OCH CIRKLAR I ESPERANTO

Utnyttja Svenska Esperanto-Förbundets erbjudande om kostnadsfri reklammateriel — samla kursdeltagarna innan alla andra kurser hinner lägga beslag på deras intressen — sänd i god tid in rekvisitioner å läroböcker och annan studiemateriel.

LÄROBÖCKER passande vars och ens speciella UNDERVISNINGSMETOD finns här i rikt urval — det är bara att välja:

## SYSTEMATISK KURS I ESPERANTO

Seppik-Malmgren. Avsedd för kurser enligt direkt metod. De lätta, gradvis ordnade exemplen föra eleven lätt och bekvämt in i språket. 88 sid.

Kr. 1:—

## SNABBKURS I ESPERANTO

Samma som ovanstående men förkortad och avsedd för affärsfolk, som snabbt önska tillägna sig språket för praktiska syften. .... Kr. 0:60

## PRAKTISK LÄROBOK I ESPERANTO

för kurser och självstudium. Övers. och bearbetad av fil. mag. S. O. Jansson. Mycket innehållsrik med goda, förklarande exempel i stort urval.

Kr. 2:—

## SKRIVÖVNINGAR till ovanstående.

Uppl. A (för kurser) tryckt på lösa blad. Kr. 0:50

Uppl. B med fullständig översättning av uppgifterna .... Kr. 1:—

## DR SZILAGYIS KURS I ESPERANTO

En rolig lärobok med 206 bilder, varibland flera serier med den världsberömde seriefiguren Adamson. Texten helt på esperanto. Till varje lektion grammatiska förklaringar på svenska .. Kr. 2:—

## KURS I ESPERANTO

av fil. lic. Fritz Lindén. En enkel lärobok särskilt lämpad för dem som saknar språklig underbyggnad. .... Kr. 0:90

## LÄROBOK I ESPERANTO FÖR ABF

av språkläraren J. Massiak. .... Kr. 2:—

## KOMMENTARER TILL DITO

för självstudium och kursledare. .... Kr. 0:50

## STUDIEPLAN

till denna lärobok avsedd för studieledaren.

Kr. 0:50

## ESPERANTO UTAN FÖRKUNSKAPER

av H. Skog & S. Jansson. Samma som SEF-s förra korrespondenskurs. Med ÖVNINGSBOK Kr. 0:50

## LÄROBOK I ESPERANTO FÖR SKOLAN

av Einar Dahl

Denna lärobok är speciellt avsedd för kurser i folkskolan. Även lärare som icke behärska språket kunna utan svårighet undervisa efter denna bok. .... Pris kr. 2:50 (Till kurser säljes läroboken till nedsatt pris kr. 1:25, tack vare framlidne C. Winbergs donation för detta ändamål.)

**NYHET!**

**ARBETSBOK till dito**

**NYHET!**

Språkbyggnadsövningar

Folkskollärare Einar Dahl har till sin lärobok utarbetat en s. k. arbetsbok av den typ, som allmänt användes i folkskolan. Boken innehåller språkbyggnadsövningar och eleven får sålunda med ledning av angivna uppgifter på egen hand utarbeta och konstruera satser, varigenom det annars så tråkiga grammatikpluggandet blir intressant och stimulerande .... Kr. 0:50

**FÖRLAGS FÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 19071

Stockholm 19

Postgiro 578